

Eŭropa Bulteno

Marto 2015, Numero 147

NI KANTU KAJ KANTIGU LA EŬROPAN HIMNON EN ESPERANTO



Komence de la 19a jarcento estis irlanda patrioto, granda poeto kaj verkisto, kiu nomiĝis Thomas Davis. Estis li kiu verkis la ege popularan kanton pri la irlanda libereco en la angla, “*A Nation Once Again*” (nacio finfine denove). En 2000 la monda servo de BBC organizis retan konkurson por voĉdoni por la plej populara kanto iam ajn. Milionoj da homoj el la tuta mondo voĉdonis. Aparte la irlanda kaj irland-devena diasporo organizis sin... kaj gajnis en la konkurso “*A Nation Once Again*”. Ne estis la kanto kiun BBC volis! Thomas Davis iam skribis ke estis egale al li kiu verkos la leĝojn, kondiĉe ke estis li mem kiu verkos la kantojn. Li konscias la intiman ligan inter kantado kaj politiko kaj la grandega povo de kantado por atingi la homamason kaj transdoni al ili politikan senton.

La iama prezidanto de EEU, Umberto Broccatelli, estis alia homo kiu komprenis tion. Do, li verkis originalajn vortojn en Esperanto por la eŭropa himno. Umberto konsciis ke la Eŭropa

Konsilio de 1985 elektis melodion por eŭropa himno, la 9an simfonion de Beethoven, sed ne elektis la vortojn, ĉar Schiller verkis “*An die Freude*” (Odo al la Ĝojo) en la germana lingvo. Do, elekti tiujn (tre belajn) vortojn, aŭ tradukon de ili al alia lingvo, donus la unuan lokon en Eŭropo al la germana lingvo, kaj rompus la principon de la egaleco de ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU. Do, estis aparte inteligente ke Umberto elektis verki vortojn por la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo, Esperanto.

Dum la roterdama UK antaŭ kelkaj jaroj Flory Witdoeckt, vic-prezidantino de EEU, kantis la Eŭropan Himnon laŭ la vortoj de Umberto Broccatelli, kaj ricevis la plej longan kaj laŭtan aplaŭdon de la tuta internacia vespero. Parto de tiu aplaŭdo certe estas pro la belega voĉo de Flory, kaj ŝia nekredibla laboremo kaj energio kiuj malaperigas la aĝon, kaj inspiras nin ĉiujn. Sed alia parto, ŝajnas al mi, estis pro la belegaj vortoj de la himno, kiuj estas tute en la spirito de Zamenhof kaj la interna ideo de Esperanto. La himno estas aŭdebla ĉe www.europano.eu.

Kiam delegacio de EEU (Jozef Reinwart, Margareta Handzlik kaj mi mem) renkontis la Prezidanton de Eŭropa Parlamento, Profesoron Jerzy Buzek (antaŭa ĉefministro de Pollando) en januaro 2010, Buzek tuj komprenis la valoron de neŭtrala lingvo por plifortigi la pacon en Eŭropo tra eŭropa integriĝo. Li ne aparte interesiĝis pri Esperanto, sed li diris ke multaj MEP-oj ŝatas kanti kune la eŭropan himnon, sed ke ĉiam estas la praktika problemo: en kiu lingvo kanti? Kaj li tuj vidis solvon: kanti en neŭtrala lingvo, kiu respektas la samrajtecon de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj de Eŭropo. Por Buzek, tiu lingvo povus esti la latina aŭ Esperanto – la elekto ne gravis, laŭ li.

Sed por ni, Esperantistoj, tiu elekto gravas. Kaj ĝi gravas por Eŭropo, ĉar en tiu elekto kuŝas la diferenco inter eliteca Eŭropo kaj demokrata Eŭropo – Eŭropo por ĉiuj civitanoj en ĉiuj membroŝtatoj. Kion ni faru praktike? Ni proponu nian eŭropan himnon senkoste al ĥoroj/korusoj en niaj propraj landoj. Flory Witdoeckt baldaŭ produktos DVD en kiu estos nia eŭropa himno kaj partoj de la naciaj himnoj de ĉiuj membroŝtatoj de EU. Tiu DVD estos ege efika ilo por disvastigi nian ideon pri pacema, tolerema Eŭropo, kie la etaj landoj samrespektindos kun la grandaj!

Tial la estraro de EEU **invitas ĉiujn eŭropajn esperantistojn laŭ siaj povoj kontakti lokajn korusojn kaj proponi al ili la kantadon de la himno en Esperanto kadre de iliaj koncertoj lige al la Tago de Eŭropo la 9-an de majo**. Tio kostas vin iom da tempo por altelefoni la korusgvidanton kaj eventuale renkontiĝi kun ili. Se ni sukcesus konvinki nur kelkdekon da korusoj ĉi-jare, tio havus gravan konsekvencon por esence pligrandigi tiun agadon en la posta jaro.

Seán Ó Riain

MALAVANTAĜOJ KAŬZITAJ DE LA EKSTERMOVADA MONDO POR ESPERANTO (3-a PARTO DE SWOT-ANALIZO)

1. La ĝenerala publiko (averaĝaj civitanoj) NE SCIAS pri ekzisto de Esperanto. Pri Esperanto ne ekzistas informado, nek en lernejoj nek inter la informrimedoj. Oni povas diri ke la ĉefa malamika rilato al Esperanto el ekstero prezentiĝas kiel IGNORADO.

2. Por ke Esperanto iĝu monda fenomeno, devus esti ĝenerala bona volo ke ĉiuj ĝin lernu. Tiu BONA VOLO POLITIKE KAJ MERKATE NE EKZISTAS. La bona volo estas antaŭkondiĉo por informado kaj propono pri interkonsento ke ĉiuj komencu ĝin lerni. Homoj kiuj eĉ akceptas la ideon pri neŭtrala monda lingvo kutime diras: Kial mi lernu ĝin nun kiam ĝi ne utilas? Mi lernos ĝin kiam ĉiuj aliaj ankaŭ faros tion.
3. Eventuala sukceso de Esperanto estas DANĜERO por multaj nuntempaj ekonomiaj branĉoj kaj profesioj (la tuta monda instruistaro pri fremdlingvoj en lernejoj, en fremdlingvaj lernejoj, altaj lernejoj, la tuta tradukistaro de la mondo, la grandaj kvantoj da budĝetoj de anglalingvaj ŝtatoj kiuj profitas per eldonado, filmindustrio, muzikindustrio uzante la anglan lingvon...) kaj ili ĉiuj rekte aŭ malrekte subfosas disvastigadon de Esperanto malebligante ke por Esperanto ŝtataj ministerioj pagu iun monon kaj ke eniru informado pri Esperanto en lernolibrojn kaj amasan informilaron.
4. PUBLIKA PSIKOLOGIO estas kontraŭa al nia movado, ĉar la homoj kiuj sukcesis certgrade lerni fremdan lingvon de kiu ili havas iun utilon ne nur ŝatas kaj uzas tiun scion sed ankaŭ fieras pro scio kiun aliaj en ilia ĉirkaŭaĵo ne havas. Tio donas al ili reputacion, kiun ili ne volas perdi, ili sentas sin pli valoraj ol aliaj. Esperanto ebligus ke ĉiu facile lernu ĝin kaj tiuj reputacioj malaperus. Averaĝa civitano de la nuntempo estas racia kaj li aktivus nur se tio utilas al li. Homoj kiuj okupiĝas pri utopioj aŭ idealismoj estas malŝatataj kaj primokataj kaj oni edukas infanojn malŝati idealismojn kaj malestimi ilin.
5. La ANGLA ĈEESTAS ĈIE kaj avenraĝaj civitanoj vidas nur tiun fakton. Fremda lingvo kiun li kaj liaj infanoj bezonas estas la angla. La angla troviĝas en hoteloj, aerhavenoj, ĝeneralaj publikaj lokoj en ĉiuj grandurboj de la mondo. La faktoj simple daŭre krias: sen la angla ne eblas nuntempe funkcii en la mondo. Kial ŝanĝi tion?
6. Minoritatoj malakceptas la ideon ke por esti egalrajtaj ili devus lerni Esperanton, por ili la trian, eĉ kvaran lingvon (apud la minoritata gepatra kaj la oficiala ŝtata, la enlernaja monda, ankoraŭ plian kvaran neŭtralan lingvon). Ili ja diras: ni ĉiukaze devas lerni unu lingvon pli ol aliaj civitanoj, kial ankoraŭ unu pli? Ni devas investi nian energion en laŭeble bonan konon de la gepatra minoritata lingvo).
7. Pro la enormaj ekonomiaj utiloj, kiujn havas unuflanke kompletaj armeoj de certaj profesioj (fremdlingvaj instruistoj, tradukistoj, kulturindustrio ligita al lingvo.... sed eĉ pli budĝetoj de ŝtatoj kiuj uzas la anglan (US, UK, Aŭstralio, Kanado, Irlando, Novzelando...) ekzistas ŝtataj institucioj kiuj zorgas ke tiu situacio ne ŝanĝiĝu, ke iu alia lingvo ne endanĝerigu tian pozicion de la angla. Ne temas ĉefe pri Esperanto, temas pri diversaj formoj de proaganda milito inter la angla kaj iuj internacie konkurencaj lingvoj en diversaj mondopartoj, kiel la hispana, ĉina, rusa, araba, franca... Tiucele ekzistas profeiaj aparatoj en sekretaj servoj kiuj sekvas la evoluon kaj entreprenas daŭre ion por defendi la anglan pozicion aŭ plivastigi ĝin. Sed simile kondukas ankaŭ ŝtatoj kun aliaj grandlingvoj (Francio, Rusio, Ĉinio, Germanio...)
Dum Esperanto estas nur hobia ludo de kelkmil esperantistoj, tiuj servoj ne tro okupiĝas pri ni, sed ĉiam kiam ni sukcesas atingi iun eblecon ke je alta politika nivelo oni komencu trakti nian aferon, tiuj servoj serioze ekokupiĝas pri ni kaj blokas ĉiun tiaspecan progreson. (Pri tio mi havas mulajn pruvojn, sed ĉi tie mi ne klarigos ĝin).
8. Por Esperanto bonaj ŝancoj estas en pacaj cirkonstancoj. Tial la ekstera situacio ĉie kie regas milito aŭ milita retoriko por la Movado estas nekonvena. Tie la politiko evoluigas fortajn naciismojn (por krei publikan psikologion ke la nacio estas en danĝero) kaj en tiuj

cirkonstancoj reklami interpacigan lingvon ne nur ne estas konvene, sed estas sendube danĝere. Kaj tiaj cirkostancoj ankaŭ nuntempe regas en tre multaj partoj de la terĝlobo. Al tio aliĝas ankaŭ la cirkonstancoj en diktatoraj reĝimoj en kiuj kun tre malmultaj esceptoj oni ne ŝatas lingvon kiu ebligas al la civitanoj pli da kontaktoj kun ekterlando.

Zlatko Tišljariĉ

ENTUZIASMO EN POLLANDO POST LA NOVEMBRA ATINGAĴO



Celante daŭrigi la vojon, komencitan per enskribo de la lingvo Esperanto, kiel portanton de esperanta kulturo sur la liston de Nemateria Kulturheredaĵo de Pollando, en Pola Senato renkontiĝis la 3-an de marto 2015 reprezentantoj de landa Esperanta movado. La Kunsidon organizis senatano prof. dr. hab. Edmund Wittbrodt, kiu prezidas Parlamentan grupon kiu subtenas Esperanton, kun ĉeesto de nova deputito Aleksander Sosna (konata en Esperantujo pro lia grava rolo por organizado de la 94-a UK-o en Bialistoko) kaj partopreno de 19 aktivaj reprezentantoj de diversaj polaj Esperanto-organizaĵoj, alvenintaj el ĉiuj regionoj de la lando. Dum inaŭgura parolado la senatano montris sian profundan konon de la temo kaj engaĝiĝon por solvi situacion de pola E-movado. Kiel enkonduko al posta vigla kaj interesa diskuto estis artikolo preparita de Kazimiro Krzyżak kaj plano por reaktivigo de E- instruantaro en Pollando proponita de Halina Komar.

Dum la diskuto, temaroj estis klarigitaj, precizigitaj aŭ korektitaj. Planita kiel 2-hora aranĝo la kunveno daŭris eĉ 3,5 horoj. Kiel la plej urĝaj ni elektis la jenajn temojn:

1. Serĉi eblecojn kaj manierojn por krei tutpollandan forumon aŭ koalicion, kiu permesus kunigi la kapablojn kaj fortojn de disigitaj E-organizaĵoj
2. Esplori bezonojn kaj ankaŭ vojojn al decidpovuloj (ankaŭ kun politika interveno) en la ŝtata eduka sistemo, cele al aldono de Esperanto al lingvoj oficiale uzataj en pola edukado kaj atesti ĝin kiel unu el egzamenligvoj.
3. Reaktivigi polan E-instruanton (temas pri rapida trejnado), ĉar la movado restis sen renovigo de la instruistaro jam ĉ.30 jarojn. La situacio iĝis katastrofa por nia movado.

4. Rekoni la eblecojn de monakirado el publikaj fontoj, por la supra celo, prilabori taŭgajn projektojn por ĉi tiu celo.



5. Preni ekzemplon de kolego Kazimiro Krzyżak, kiu persiste dum jaroj, konstruas la kontaktojn kun politikistoj por ke ĉiu organizaĵo trovu simpatianojn de Esperanto en la loko de sia agado kaj komencu kontaktojn lokajn, regionajn, landajn aŭ eĉ najbarlandajn. Estis konfirmita, ke danke al politika helpo, esperantistoj atingis pli multe ol antaŭe estis atendite.
6. Polaj ekzemploj influu al aliaj landoj, kie eblas organizi similan strukturon por la subtenado al Esperanto per parlamentanoj kaj tion oni jam komence planis fari ĉi jare – unue per kunigo je streboj de Viŝegradaj Landoj – V4 dum jubilea Ekonomia Forumo en Krynica 2015.
7. Sendi petdemonstron al UEA ĉu oni konsentas inviti kelkpersonan grupon de eŭrodeputitoj al Jubilea UK en Lilo? Oni ne kredas, ke povas ekzisti grandaj kongresoj sen interpretistoj, ke homoj el la tuta mondo libere komunikiĝas nur danke al unu lingvo. Tio estus duflanka profito: politikistoj ekkonus la idealan solvon por interhomaj kontaktoj, kaj kongresanoj vidos, ke eblas kunlabori ankaŭ kun politikistoj, kiuj povos helpi porkontribui al diskonigo de Esperanto.
8. Prilabori larĝan strategion pri promociado de Esperanto, nun ofte forgesita.

Dum la kunsido estis kreita laboroteamo, kies celo estas kunrdigi la strebojn – prilabori konkretan planon de kunlaboro kaj komenci realigadon de la plej urĝaj taskoj. La elektita Laboroteamo konsistas el:

1. Halina Komar (Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz) - gvidanto de la Laboroteamo
2. Kazimierz Krzyżak (Europa-Demokracja-Esperanto), Gdynia
3. Konrad Andrzejuk (Fondaĵo de Zamenhof), Białystok
4. Piotr Hołda (Pola Esperanto Junularo), Kraków
5. Małgorzata Komarnicka (Regiona Buroo CEM), Wrocław
6. Stanisław Mandrak (Pola Esperanto Asocio), Gliwice
7. Barbara Pietrzak (Universala Esperanto-Asocio), Warszawa
8. Irena Tomaszewska (Filio de PEA), Szczecin

Entuziasmo por la laboro estas granda, ĉar nur dum kelkaj tagoj jam alvenis konsentoj kaj deklaroj al kelkaj el supraj temoj – Konrad Andrzejuk deklaris, ke dum 2 semajnoj li provos

prepari materialojn por la punktoj 2 kaj 8. Pri la sepa temo okupiĝas K. Krzyżak. Pri la sesa temo jam estis iomete aranĝite flanke de la senatano kaj kontaktoj daŭros ĝis EF en Krynica – se temas pri kunaj agoj por Esperanto en landoj V4, sed estus bonege, se ankaŭ en aliaj landoj oni postsekvus niajn paŝojn sur kampo de rilatoj kun politikistoj. Por Halina Komar restis temoj 3-4.

Sed mi ricevis fortan subtenon de Ilona Koutny, kiu deklaris nome de UAM Poznan kaj ŝia Interlingvistika Fakoj, seriozan helpon por montritaj planoj pri reaktivado de instruanto en Pollando kaj fakan protektadon por la tuto.

Halina Komar kaj Kazimierz Krzyżak

PRILINGVA KONFERENCO EN CACERES (HISPANIO)

La 17-an de marto Seán Ó Riain faris la ĉefan prelegon en la konferenco MIME - Languages in Media (Lingvoj en la Amaskomunikiloj). La konferenco estas la kulmino de projekto kiun financis EU en kiu kunlaboris universitatoj el 5 landoj: Hispanio, Germanio, Pollando, Italio kaj Britio, kaj estis en la Universitato de Extremadura. Ĉeestis 70 partoprenantoj el la 5 landoj. La projekto celas pli bone instrui lingvojn al enmigrintoj por helpi ilin integriĝi al nova lando. La temo elektita de Seán Ó Riain estis "Respect for other people and other languages" (Respekto por aliaj homoj kaj aliaj lingvoj), kaj baziĝas sur la tre efika afiŝo de la brita projekto Springboard to Languages videbla ĉe http://www.springboard2languages.org/wp-content/uploads/2013/03/poster_respect.pdf. Angela Tellier donis permeson uzi la afiŝon, kaj Seán disdonis ĝin al la tuta ĉeestantaro. Li parolis dum duonhoron kiel vicprezidanto de la Eŭropa Civitansocia Platformo for Multlingvismo, kaj povis klarigi la lernfaciligajn ecojn de Esperanto al tiuj edukistoj el 5 landoj. La reago estis tre pozitiva.

Maja Tišljar

FONDAĴO CIGNO PREMIIS SLOVAKION



En marto la estraro de Fondaĵo Cigno aljuĝis por la lasta fojo la Premion Cigno. Ĝin oni atribuis al **Slovakia Esperanta Federacio** (SKEF) pro ĝia impresa informa agado landskale en 2014.

Fondita en 1995 kiel Subvencio Cigno, ĝi premiis esperantistojn en evolulandoj farintaj gravan kontribuon al la Movado. En 2011 ĝi transformiĝis je Fondaĵo Cigno, celanta premii landan asocion ene de la Eŭropa Unio, kiu plej bone informis la eksteran publikon pri Esperanto en la periodo de unu jaro. En 2012 la premion ricevis [Esperanto-Asocio de Britio](#) (EAB), kaj en 2013 estis premiita [Ĉeĥa Esperanto-Asocio](#) (ĈEA).

Pro la maljuniĝo de la fondinto kaj ĉefa mecenato de Fondaĵo Cigno kaj pro lia necesa decido redukti la labortempon kaj diverskampan agadon, la Estraro decidis ĉesigi sian agadon.

Ayako Kawakita
Prezidanto de Fondaĵo Cigno

PRI VERDAJ SKOLTOJ KAJ ILIA PEKO



La Verdaj Skoltoj proponas internacian skoltumadon en Esperanto. La partoprenantoj estas inter 11 kaj 17 jaraĝaj. Ili venas el Bruselo, Flandrio, Valonio, Francio, Luksemburgo kaj Germanio. Foje de pli fora loko!

Esperanto estas ilia sola komuna lingvo!

Ĉiuj lernas tiun rapide lerneblan lingvon. Tiel ili povas egale interkomunikiĝi. Kiam ĉiu faras paŝon al la aliaj estas pli afabla, ĉu ne?

Kion ili faras?

Ili kuniĝas dum 7 semajnfinoj jare kaj organizas tutsemajnan tendumadon en somero. Ĉiuj estas bonvenaj ;-). Tiel kiel ĉiuj skoltoj: ili lernas zorgi pri si mem (kuiiri, tendumi, orientiĝi, fajron fari...), ili ludas, foje kantas, babilas, ili faras manlaboraĵojn (konstruas aferojn el ligno, kuiras en la naturo) kaj ili travivas pli kaj pli da aventuroj. Ili ankaŭ informas pri Esperanto, organizas Esperanto-eventojn kaj instruas Esperanton al siaj novaj membroj. Inter la 8a kaj 10a de majo 2015 la Printempa Esperanto/Kunveno (PEKO) estos organizita fare de la Verdaj Skoltoj en la belga urbo Mozet.

Danke al subteno de Asocio Por Esperanto (la valona eo-asocio) kaj Esperantista Brusela Grupo, Verdaj Skoltoj fondis veran asocion kaj dungis Valère Doumont ekde februaro por profesiigi tiun projekton.

Unu monaton post la fondo, jam videblas la unuaj rezultoj:

- nova simbolo, mult-uzota (sur vizitkartoj, aŭto, flagoj, skoltotuko...)
- komuna ludo kun la skoltoj el Sambreville, 30 junuloj nun scias pri Eo
- jam tri novuloj gustumis ilian etoson kaj ilian lingvon
- prezento de la projekto en Luksemburgo

Kaj ili havas multajn projektojn: kun-organizi Internacian Infanan Kongreson (paralela aranĝo kun la Universala Kongreso en Lillo), informi pri Esperanto en lernejoj, prezenti siajn projekton en Esperanto-klubo, okazigi ludojn kun aliaj skoltoj...

La gvidado de Verdaj Skoltoj fare de dungita profesiulo povos daŭri ĝis kiam restos mono, do gravas multnombra partopreno en PEKO, aliĝo al ilia asocio kaj subteno. La skoltoj antaŭdankas vin.

Jean-Pol kaj Valère (El Edukado.net)

TEJO GAJNIS EĈ TRI FINANCAJN SUBVENCIOJN DE EŬROPAJ FONDAĴOJ



Ĉi-jare TEJO sukcesis ricevi eĉ tri subvenciojn de Eŭropaj fondaĵoj. Unu estas por realigi projekton »Elloke Tutmondene« en kiu partoprenas Bjalistoka E-Societo, Eurokka, E-Klubo Visaginas, Triesta Esperanta Asocio, Verĉela E-Grupo, E-Asocio de Skotlando. Por tiu projekto ĝi ricevis ĉirkaŭ 60.000 eŭrojn kaj la unua renkontiĝo de tiu projekto pri trejnado de aktivuloj jam okazis en itala urbo Vercelli. La dua subvencio rilatas al kostoj de volontulo (7.500 eŭroj) kaj la tria, aparte grava, estas subvencio por administraj kostoj de TEJO en

2015 (simple por ĝia funkciado) de 20.000 eŭroj.

Zlatko Tišljar

REAGO DE NICOLA MINNAJA PRI LA FLAM (SWOT) ANALIZO DE LA E-MOVADO



Rimarko: FLAM estas la esperanta traduko de la anglalingva akronimo SWOT, traduko enkondukita de UEA por la AMO-seminarioj. La signifo de la komencliteroj estas: Fortoj, Lamaĵoj, Avantaĝoj, Minacoj.

Premiso: Kutime FLAM-analizon oni faras por antaŭtaksi la probablon, ke la celo estos atingita. Tio implicas, ke la celo estas konata. La ĝenerale akceptata celo de la esperanto-movado (la karmemora “fina venko”, kvankam tiu nomo eksmodiĝis), estas: “esperanto estu la dua lingvo por ĉiuj”. Tio ne koincidas kun la celo de la Esperanta Civito: “esperanto estu la unua lingvo de unu lingva minoritato.”. La analizo de la lamaĵoj farita de Zlatko Tišljar en la januara numero de “Eŭropa Bulteno”, kaj komentota ĉi tie, koncernas la unuan celon.

Fortoj: Ĝenerale la esperantistoj konas tiujn fortojn: esperanto estas funkcia lingvo; minoritato, por kiu ĝi estas la unua lingvo, fakte ekzistas; en la reto aliras esperantajn paĝojn pli ol 100 mil uzantoj; mi aldonu, ke ĝi estas rekonata lingvo (tion pruvas la fakto, ke la supersignitaj literoj eniris en la internacian kodsistemon), aŭtomataj tradukprogramoj ĝin uzas (ekzemple Google), en Vikipedio estas konsulteblaj pli ol 200 mil artikoloj en esperanto (la 27-a lingvo laŭ nombro).

Lamaĵoj: Tio, kion asertas Zlatko, estas grandparte vera, kvankam persone mi trovis inter la gvidantoj de la movado valorajn personojn, plurajn universitatajn profesorojn, urbestrojn de gravaj urboj, ambasadorojn, eĉ unu Nobel-premiiton. Tamen laŭ mi la ĉefaj lamaĵoj, nur parteigitaj al tiuj cititaj, estas du. Esperanto estas ofte rigardata de la ekstera mondo kiel utopio, neniam realiĝonta, kaj tio fortimigas la alproksimiĝemajn personojn. La dua, kaj pli grava, estas la manko de “marĝena utilo”, tio estas de avantaĝoj kiujn esperanto donus tuj al nova adeptulo, ankaŭ se la “ĉefa celo” ne estus atingita: la aparteno al tiu ekzistanta “unulingva minoritato” ne allogas sufiĉe; se ĝi permesas ja ĝui sian liberan tempon, ĝi tamen ne faciligas la akiron de laborposteno, per kiu oni povu honeste perlabori siajn vivrimedojn.

Minacoj: La ĉefa, fakte sola, minaco estas unu: la angla lingvo. Ĝi konkurencas kun esperanto strebante al la sama ĉefa celo; ĝia avantaĝo estas ĝuste la “marĝena avantaĝo” ĵus citita. Koncerne Eŭropon, tiu minaco estas des pli grava, ju pli la lingva politiko de la Eŭropa Komunumo, konscie aŭ nekonscie, ĝin favoras, aŭ eĉ adoptas.

Avantaĝoj: La avantaĝo de esperanto estas neŭtraleco, kiu nur parte kompensas la lamaĵojn kaj la minacon, kaj donas nur malgrandan “marĝenan avantaĝon. Ĉu ĝi estas valorigebla en Eŭropo hodiaŭ? Pri ebla valorigo atentigas Giorgio Pagano en sia mesaĝo al kunveno pri “La itala lingvo kaj la latinidaj lingvoj invaditaj de angleca vortprovizo”, okazinta la 22-an de februaro en Florenco. Tiun mesaĝon mi, kun lia permeso, proponas al “Eŭropa Bulteno” kiel sekvon de ĉi tiu artikolo.

En la januara numero mi komencis SWOT-analizon de la Esperanto-Movado kaj prezentis la unuan el la kvar elementoj de la analizo: la malavantaĝojn, (internajn malfortojn). Nun mi surtabligas la duan parton: La avantaĝojn:

1. Forta ideologio kiu diras ke per esperantigo de la mondo oni grave influos al la monda paco. La ideologio ne estas detruenda ĉar ja ne eblas pravi ĉu ĝi pravas aŭ ne, sed multaj homoj ŝatas ĝin kaj kiam ili akceptas ĝin, ili ĝin ne forlasas. Ĝi estas la ĉefa kaŭzo de kuntenado de la socia grupo de esperantistoj. La historio montris ke ĝin ne eblas detrui, malgraŭ ĉiuj eksteraj malfavoraĵoj kiel militoj, totalismaj reĝimoj k.s.
2. La komunumo de esperantistoj estas multoble pli edukita ol averaĝaj civitanoj en kiu ajn lando. Klare ke inter esperantistoj ne ekzistas analfabetoj kaj ke granda plimulto estas sufiĉe alte edukita.
3. Aparte elstaras neproporcie alta kvanto da bonegaj fakuloj pri informadiko, kiuj kreas por Esperanto modernajn ilojn kiujn ofte eĉ grandaj nacioj ne havas. La fenomenoj kiel WikiTrans aŭ Esperanta vikipedio montras tiuspecan supercon de E-komunumo
4. Esence pli alta kono de lingvoj ĝenerale. Meza kono de lingvoj ĉe plenkreskaj esperantistoj estas inter 3 kaj 4 kaj tiom altan proporcion verŝajne ne havas iu ajn popolo.
5. Pro la unua punkto, esperantistoj kapablas kiam temas pri iu perspektiva afero por E-movado multe pli efike krei internacian kunlaboragadon ol aliaj. Ekz. la sukceso pri propono de poloj al UNESCO proklami la jaron 2017 Zamnehof-jaro. Dum tri tagoj ducento da esperantistoj el deko da landoj harmonie kunlaboris kaj kreis ion kio teorie ne estus ebla se tion organizus profesia entrepreno. Sekve Esperanto-komunumo kapablas tre efike eluzi la modernajn internaciajn rimedojn por atingi tre efikan internacian kunlaboron.

6. Kvankam laŭkvante la komunumo vere ne estas granda, ĝi estas tre bone distribuita tra la tuta mondo. Verŝajne eĉ ne romaoj kaj judoj havas tian distribuon tra la mondo.

7. Pro la granda diverseco de apartenoj al nacioj, rasoj, religioj, fakaj intereso, politikaj orientiĝoj, sed ankaŭ pro tre efika lingva rimedo kiu ebligas tujan aliron al informoj el tre diversaj fontoj, esperantistoj averaĝe pli bone komprenas la neceson pri tolero al aliuloj kaj fakte praktikas tion kio en EU estas nur slogano: Unueco en diverseco.

8. Pro la fakto ke granda plimulto de lingvistoj traktas Esperanton neobjektive volante negi ion kio povus laŭ ilia opinio endanĝerigi la naciajn lingvojn, eĉ negas ĝian ekziston aŭ kapablon havi kulturon ktp, esperantistoj – klare konsciante ke tiu scienco evidente uzas tro da subjektiveco – perdas la senton de oboe al scienca aŭtoritato kaj pretas okupiĝi pri alternativaj sciencaj esploroj, kio povas konduki al gravaj novmalkovroj.

Nicola Minnaja

KVARDEKSES JAROJ DE BUDAPEŝTA MEDICINA ESPERANTO-FAKGRUPO

Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) fondiĝis la 2-an de marto, en la jaro 1969. En marto de 2015 ni festis do la 46-an naskiĝtagon de la Fakgrupo. Depost nia fondiĝo la ĉefa celo de nia Fakgrupo estis ĉiam la scienca, medicina aplikado de la Internacia Lingvo, ĉar laŭ nia forta konvinkiĝo la scienco nepre bezonas justan, neŭtralan, komunan lingvon certigantan veran, lingvan egalrajtecon por ĉiuj scienculoj. La unuajn jarojn de nia agado ni dediĉis al la lingvolernado. Ni traripetis la tutan lernolibron de Julio Baghy. Iom post iom nia membraro akiris la deziratan lingvan nivelon. Jam en la jaro 1969. aperis niaj unuaj artikoloj en la cirkulero Medicinistaj Novaĵoj, redaktita de d-ro Jozefo Hradil, en la tiama Ĉeĥoslovakio. Depost marto de 1969 nia Fakgrupo kunvenis, kaj ankaŭ nun kunvenas – escepte de aŭgusto – ĉiun unuan, labortagan merkredon de ĉiu monato. Tio signifas, ke ni organizis ĝis nun jam pli ol 500 kunvenojn.



En la jaro 1971 ni la unuan fojon organizis Esperanto-lingvokurson por kuracistoj kaj flegistinoj, sub gvidado de d-rino Károlyné Nanovfszky, en la Budapeŝta Hospitalo László por Infektaj Malsanoj. Dum nia regula, oktobra kunveno en la jaro 1972 fondiĝis la Hungara Sekcio de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). D-ro Imre Ferenczy fariĝis afergvida prezidanto de la sekcio, kaj ni elektis d-ron

István Hegyi, kiel lingvan konsilanton de la gvidantaro.

Ekde la jaro 1973. niaj popularsciencaj kaj sciencaj agadoj evoluis paralele. En novembro de tiu jaro ni aranĝis nian unuan sciencan vesperon kun esperantlingvaj prelegoj. Dum la ceteraj kunvenoj d-rino Julianna Farkas – inter aliaj programeroj – laŭtleĝadis detalojn el la „Lernolibro pri oftalmologio” de la japana Profesoro d-ro Seiiĉi Kato. La tekston d-ro Lajos Molnár tradukis hungaren kaj klarigis por la aŭskultantaro. Por aktivigi la membraron depost tiu tempo la partoprenantoj laŭtleĝis esperantlingve kaj tradukis hungaren dum ĉiu kunveno, sisteme la ĉapitrojn de la bonega, popularsciencia verko de Alberto Fernández: „Senĝenaj Dialogoj”. Partoprenante niajn programojn la ĉeestantoj povis akiri interesajn konojn, kaj samtempe ni ĉiuj povis alproprigi abundan, sciencan vorttrezoron.

Depost 1974 ni jam regule organizis solenajn, sciencajn prelegseriojn la unuan merkredon de ĉiu monato marto, memore al la datreveno de fondiĝo de nia Fakgrupo. Ni partoprenis en la redaktado de la esperantlingva parto de plurlingva, Sanitar-Ekonomia Vortaro de la Organiza, Projekta kaj Informa Centro de la tiama, hungara Ministerio pri Sano. Dum ties redaktado ni ankoraŭ povis kunlabori kun profesoro d-ro Kálmán Kalocsay.

Ekde la jaro 1975 ni regule kunlaboris kun profesoro d-ro Ottó Haszpra en redaktado de la Sciencaj Komunikaĵoj, la bonega, sciencia aldono de la revuo Budapeŝta Informilo. Samtempe ni aperigis plurajn, hungarlingvajn artikolojn en revuoj kaj gazetoj pri la valoro kaj estonto de Esperanto. En 1976 aperis nia sciencia artikolo „Varicelo de infanoj kuracitaj per kortikosteroidoj kaj imunsupremantaj medikamentoj” en la Medicina Internacia Revuo. La artikolo gajnis la belegan, arĝentan memormedalon de la UMEA Shinoda-Premio.

En la jaro 1977 ni partoprenis la 1-an Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon (IMEK) en Krakovo. Okaze de la 1-a IMEK ni povis interkonatiĝi kun d-ro Włodzimierz Opoka, kiu tiutempe estis juna, universitata studento. Li estis la ĉefa motoro de la konferenco, kaj ni akiris belegajn memorojn pri Krakovo kaj Pollando. Fine de la 1-a IMEK kvar hungaraj medicinistoj ricevis de la Rektoro de Krakova Medicina Akademio la memormedalon „Nikolao Kopernik”. Je iniciato de s-ro Miklós Láng, teknika redaktoro de la hungara revuo Gyógyszerészet (Farmacio) en 1978 ni komencis sisteme esperantigi la resumojn de la sciencaj artikoloj tie aperantaj. Helpe de s-ino Istvánné Jenővári, la tiama redaktorino de la semajnavuo Orvosegyetem (Medicina Universitato) en la sama jaro ni komencis prezenti Esperanton por la studentoj de la Budapeŝta Medicina Universitato Semmelweis. D-rino Judit Boros (kiu estis tiutempe medicina studentino) verkis plurajn, bonegajn artikolojn por la revuo. Foje ŝi interpretis hungaren la esperantlingvan, universitatan prelegon de nederlanda profesoro pri nukleaj medicinaj aparatoj.

Somere de 1979 okazis en Hódmezővásárhely la 2-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. S-ino Katalin Faragó, bibliotekistino de la Urba Hospitalo, brile organizis la Konferencon, kiun partoprenis 150 kuracistoj, apotekistoj, flegistinoj kaj veterinaroj el 8 landoj de Eŭropo. La partoprenantoj povis aŭskulti 35 esperantlingvajjn, sciencajn, popularsciencajn prelegojn. Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo kunordigis la prelegserion.

En la jaro 1980. ni fondis la Memormedalon Zamenhof de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo. Ĝis nun 28 eminentaj, poresperantaj agantoj ricevis tiun ĉi memormedalon kreitan de s-ro Sándor Józsi, belartista laboranta en Hódmezővásárhely.



Komence de la 80-aj jaroj s-ino Józsefné Farkas-Tatár gvidis grandsukcesan Esperanto-lingvokurson por medicinistoj en la hungara Ministerio pri Sano. Inter la jaroj 1983 kaj 1985 kelkaj membroj de nia Fakgrupo – inter ili d-ro Miklós Fehér, d-ro Balázs Szemők kaj d-ro Lajos Molnár – kolektis la anatomiajn, farmaciajn, medicinajn, veterinariajn, stomatologiajn kaj dentoteknikajn fakesprimojn por la pretiĝanta, Hungara-Esperanta Meza Vortaro.

La reĝimo-interŝanĝo (en la jaroj 1989-1990) ne tro favoris la Esperanto-movadojn de niaj post-socialismaj landoj. Pluraj, budapeŝtaj esperanto-kluboj malaperis. En tiu ĉi treege malfacila periodo aliĝis al nia Fakgrupo s-ro János Sárközi, fizikisto, eminenta esperantisto kaj artradukisto, kiu ĝis sia morto riĉigis niajn programojn. Li tradukis esperanten la gravan kaj tre utilan kajeron „Laborant-protektado antaŭ la ekrano”. La kajero – kies plurcent ekzemplerojn ni disdonis al niaj esperantistaj geamikoj – helpas gardi la sanon de uzantoj de komputiloj.

Samtempe s-inoj Kornélia Nagy, instruistino pri gimnastiko kaj Klára Szabó, naturterapiistino fidele helpis nin teni en vivo la Fakgrupon. Ni ŝuldas profundan dankon al s-ro Thierry Salomon, kiu helpis nin en alproprigo de bazaj konoj de la uzado de nia unua komputilo, en la jaro 2000. Li pretigis ankaŭ la unuan retejon de nia Fakgrupo <http://www.sano.inf.hu>.

Por nia fidela, por-esperanta agado nia Fakgrupo en 2001, dum la zagreba Universala Kongreso kolektive ricevis la memormedalon de la UMEA Shinoda-Premio.

En 2002 ni verkis kaj eldonis – kune kun S-ro Oszkár Princz – hungarlingvan kajeron „Kaj ankoraŭ kial utilas por mi Esperanto?” por tiuj plurmil gejunuloj, kiuj metis en Hungario ŝtate rekonitajn lingvoekzamenojn pri Esperanto.

Kune kun Oszkár Princz, László Gados, Thierry Salomon, János Vida kaj d-ro Balázs Wacha ni partoprenis en la redaktado de la periodaĵo Eŭropa Unio kaj la Lingva Demando. Okaze de aliĝo de Hungario al la Eŭropa Unio kune kun 17 kunlaborantoj en la jaroj 2003-2004 ni tradukis Esperanten la unuajn du ĉapitrojn de la Traktato pri estigo de Eŭropa Konstitucio. D-ro Seán Ó Riain, irlanda eŭropunia diplomato, la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio disdonis 800 ekzemplerojn de la angla-esperanta versio por la politikistoj de la Eŭropa Unio.

Ekde la jarmilŝanĝo fortiĝis la kontaktoj de nia Fakgrupo kun profesoro D-ro Endre Dudich, honora membro de UEA kaj Honora Prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio. Li tre aktive partoprenis en la esperantigo de la Konstitucia Traktato, kaj – kune kun nia brita amiko, s-ro David Curtis – pretigis plurajn anglajn tekstojn por ĝia angla-esperanta versio. Meze de la pasinta jardeko ni tradukis Esperanten la retejon pri la grandsignifa malkovraĵo de d-ro Gyula Kulcsár, „La Pasiva Antitumora Defenda Sistema”. En la jaro 2006 dum la 91-a Universala Kongreso en Firenze ni prelegis pri la malkovraĵo kaj disdonis 50 kompaktnajn diskojn kun

videofilmo pri prelego de d-ro Kulcsár. Por la videofilmo ni pretigis la esperantlingvan subtekston.

S-ro István Mészáros kontinue faris tre valoran laboron kadre de nia Fakgrupo. Li preparis la eldonojn de la hungara-esperanta kaj angla-esperanta versioj de la *Konstitucia Traktato* kaj aranĝis ankaŭ la esperantlingvan subtekston de la kompakta disko kun la prelego de d-ro Gyula Kulcsár pri la natura antitumora defenda sistemo. Li redaktas la eminentan, multflankan, plurlingvan retejon <http://www.egalite.hu>.

Konvinkiĝinte, ke nuntempe la junaj studentoj de medicino kaj la kuracistoj apenaŭ okupiĝas pri Esperanto, por antaŭenigi la lernejan instruadon de la Internacia Lingvo, en majo de 2006. d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas fondis la *Internacian Laborgrupon por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto (ALIE)*, kies laboron apogas du retejoj kaj aparta, interreta diskutlisto (esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com) kun pli ol 200 partoprenantoj el 40 landoj. Ni kunlaboras kun d-rino Katalin Kováts, kiu redaktas la grandiozan, por-instruistan retejon <http://www.edukado.net>.

En la „Strategia laborplano” de nia Laborgrupo ni rekomendas la instruadon de Esperanto en la bazlernejoj, kiel unue lernendan, fremdan pontolingvon kaj kapablo-evoluigan lernobjekton; en mezlernejoj, skoltaj aŭ pioniraj taĉmentoj, junularaj organizaĵoj, kiel relative facile alproprigeblan ilon de la interkultura dialogo; en la universitatoj kaj altlernejoj, kiel „katalizan lingvon” al la alproprigo de la klasika, latina-greka, scienca vorttrezoro kaj al kreskigo de pli efika uzado de aliaj lingvoj.

La 4-an de marto 2009 ni solene festis la 40-an naskiĝtagon de nia Fakgrupo. S-ro András Lukács, la gvidanto de la medioprotekta Laborgrupo Aero parolis pri ilia aktiveco kaj pri siaj malnovaj kontaktoj kun Esperanto.

Dum la jaroj de la tutmonda, socia-ekonomia krizo ni pensis tre grava, ke nia agado devas servi – helpe de la internacia pontolingvo Esperanto – la sanon en ĝia pli vasta senco, kiel korpan, animan kaj socian harmonion. Dum niaj sistemaj, monataj kunvenoj, diskuttrondoj, spiritaĵoj regule okazas prelegoj pri san-protektado: muziko-terapio, naturkuracado, ĉiutaga, diverstipa gimnastiko, lingvaj ekskursoj, novaj, infektaj malsanoj, Yumeiho-terapio, mensa trejnado, instruado de Esperanto por triaĝuloj.

Ekde majo de 2010 ni funkciigas la novan diskutliston medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com por helpi la agadon de la Universala Medicina Esperanto-Asocio. En aŭgusto de 2010 ni aperigis la unuan artikolon en la Esperanta Vikipedio sub titolo Borelioza Lyme. La interesiĝantoj povas ĝin trovi en <http://eo.wikipedia.org>.

Dum la unua duonjaro de 2012 d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas pretigis la paralelan, hungaran-esperantan version de la nova Fundamenta Leĝo de Hungario. Pluraj membroj de nia Fakgrupo aktive partoprenas la redaktadon de la grandsukcesa, interreta frazokolektaĵo TATOEBA, kie Esperanto en 2012. okupis jam (inter proksimume 200 lingvoj) la duan lokon. Ni aperigis tie multajn frazojn kun medicina enhavo. Vidu la retejon <http://www.tatoeba.org/epo>.

Somere de la jaro 2014. okazis en Budapeŝt la 19-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, kies ĉeforganizantoj estis s-ino Katalin Faragó, s-ro János Nagy, ekonomia vicprezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio kaj profesoro d-ro Włodzimierz Opoka,

ĝenerala sekretario de UMEA. Kompreneble, ankaŭ la – jam ne tro juna – membraro de la Fakgrupo entuziasme helpis la organizantojn.



Nia Fakgrupo sendis al la partoprenantoj de la 19-a IMEK la sekvan mesaĝon:

„Kio estas la popolsanitaro rolo de Esperanto en la informadika epoko?

- Ponto-lingva rolo: Esperanto helpas, ke la tuthomara saĝo atingu la interesiĝantojn.

- Kapabloevolua rolo: Esperanto helpas la infanojn lerni aliajn lingvojn, helpas la adoleskulojn trovi amikojn en la mondo surbaze de lingva egalrajteco, helpas la plenkreskulojn pli efike uzi aliajn naciajn lingvojn,

riĉigante ilian latinan kaj grekan, sciencan vortrezoron, kaj helpas la triaĝulojn trejni ilian cerbon: – „kontraŭ kalkiĝo cerba gimnastiko”.

- Egalrajta, komunumo-konstrua rolo: Esperanto helpas la komunikadon kaj interrete, kaj persone; ekzemple: ĝemelurbaj, junularaj, sciencaj, artaj, sportaj renkontiĝoj, ekonomiaj rilatoj.”

Lajos Molnár kaj Julianna Farkas

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de marto 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Halina Komar, Kazimierz Krzyżak, Maja Tišljár, Ayako Kawakita, Jean-Pol kaj Valère, Carlo Minnaja, Lajos Molnár kaj Julianna Farkas

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

